Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

https://translate.google.com/

PLENUMITA 06/10/2016 Ducentnaŭdeka eldono 06/10/2016 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



SENDATA AL 305. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Ekstudis pli ol **550,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.
https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online (Ekde la 28a de Majo 2015)

Arablingvaj landoj

En la lasta jardeko la komisiono de UEA pri tiu laborkampo atingis kelkajn rezultojn sed la situacio de la parolantoj de Esperanto en arablingvaj landoj restas tre malforta laŭ la nombro de la parolantoj.

Nun ni volas redoni impulson al la agado. Pro tio ni volas transformi nian provizoran paĝon http://esperanto-arab.jimdo.com/ al tre pli bela paĝo, krei belan flugfolion kaj retan tekston pri Esperanto en la araba, kaj intensigi la sendadon de lernolibroj en la araba al petantoj. Imagu, ke ni ricevis lastatempe petojn el Damasko, Sirio. Rifuzi sendi lernolibrojn de Esperanto al Sirio egalas al favorado de plua militado tie.

Intertempe ni ankaŭ okupiĝas pri aliaj mezorientaj regionoj kaj nun celas fejbukan kampanjon por renaskigi el la cindroj la Esperanto-movadon en Azerbajĝano. Rigardu la paĝon Esperanto Azərbaycanda en Fejsbuko.

Malgraŭ la financa helpo de UEA ni ankaŭ bezonas helpon de unuopaj esperantistoj, kiuj pensas, ke ni semu kaj semu konstante. Sendu vian esencan eĉ se malgrandan kontribuon al la konto "arabio" ĉe UEA. Pagmanieroj en http://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj . Indiku "por arabio".



Komisiono de UEA por agado en landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko
Renato Corsetti, 117 Dukes Avenue, London N10 2QD, UK/Britujo
tel. +393286315655, +447399273515 renato.corsetti@gmail.com

★★★



La Manly Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabatojn 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso de senpaga kafo Ĉe la kunveno okazinte je 1a Oktobro venis la kutimaj Roger, Chris, John, Eunice kaj Ian. Ni parolis Esperante kaj legis el malnova Esperanta teksto kiun Chris kunportis al la kunveno.

★★



Esperanto-Federacio de NSK

Raporto estas pri unu kunveno okazinta je Esperanto-Domo.



Hodiaŭ (2-10-2016) okazis la monata kunveno en Sidnejo. La nova prezidanto de la federacio: Jonathan Cooper tre lerte prezidis ĝin. Richard Delamore parolis pri sia projekto Amikumu ,kiu povus fariĝi giganta projekto. Benjamin parolis pri la prezento pri Esperanto, kiun li faros la 29an de Oktobro kadre de Performance space en Esperanto-domo. Post komuna manĝeto Jonathan Cooper prelegis pri gravaj retejoj por Esperantistoj kaj finfine ni ludis pendumilan ludon en kiu ni devis diveni vortojn. Nur unu fojon Jonathan sukcesis "pendumi" nin!



Amike, Nicole

★★

Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti

Merkredvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum Ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaj eventoj.

Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas.

★★★

Pri AE289



Aperis amuza tajperaro en mia raporto pri la kvizo en Adelajdo.

Bob Felby ludas DOMRON (instrumenton similan al gitaro), sed en via bulteno aperas "DORMA ludado".


Amike, Trevor Steele

★★★★

Mi pardonon petas. Mi ne povis trovi la vorton „domron" en mia malgranda vortaro Roger S

★★

Vortpluformado.



Antaŭ kelka tempo mi klarigis la regulojn por aglutine fari novajn vortojn el ekzistantaj Fundament'ecaj radikoj. Ili estas ke antaŭ la finaĵo la ĉefelemento situas laste, ke devas ĉeesti la nocioj de specialeco kaj de la rilato inter la du (aŭ pli) elementoj, kaj ke la nova vorto estu unu vorto, do sen streketoj nek internaj ĉefliteroj nek internaj finaĵoj.

Mi nun mencios la diversajn specojn de vortpluformado en Esperanto. La plej multaj, dek da ili, estas aglutinaj, sed en la etnaj aglutinaj lingvoj uziĝas nur unu aŭ du da ili. Jen ili estas:

1). Ĉefelementa substantivo aŭ verbo aŭ adjektivo, ekzemple "manĝo", kiel subjekto de sekvanta prepozicio kun sia objekto (kune la prepozitivo), ekzemple "en la vespero", . Ĉi tiu

speco estas la plej multe uzata, kaj estas la preskaŭ nura speco en la etnaj lingvoj aglutinaj. Jen ekzemploj: “Manĝo en la vespero” fariĝas “vespermanĝo”, “taŭga por infanoj” fariĝas “infantaŭga”, kaj “ludi per pilko” fariĝas “pilkludi”.

2). Substantivo kun sia adjektivo aŭ, multe malpli ofte, verbo kun sia adverbo aŭ kun sia (rekta) objekto, sed nur por formi adjektivojn aŭ adverbojn, ne substantivojn nek verbojn. Ĉi tiu speco apenaŭ uziĝas en etnaj lingvoj, sed ofte en Esperanto. Jen ekzemploj : koloro de ruĝa rozo fariĝas ruĝroza koloro aŭ kolorigi ruĝroze, alkuri por tuj helpi fariĝas tujhelpe alkuri, kaj amuziĝi per kapti fiŝojn fariĝas fiŝkapte amuziĝi. Speciale la substantivoj kun adjektivoj ĉi specaj estas popularaj en nia lingvo.

3). Prepozicio kun sia prepozitivo, por fari adjektivojn kaj adverbojn. Ekzemploj: (flago) sur la monto fariĝas montsura (flago) kio fariĝas surmonta (flago) kaj (manĝi) ekster la domo fariĝas (manĝi) domekstere kio fariĝas eksterdome. Ĉi tiu speco estas tre populara en Esperanto, sed nur iomete nur en la angla. Notu ke ĝi sekvas la aglutinajn regulojn, sed ke pro tio ke la prepozicioj kiel ĉefelementoj estas tre mallongaj je la fino de vorto kaj ke konsekvence la vortoj ne plu estus rekoneblaj, oni plej ofte devas renversi la vicordon por havi la ĉefelementon, la prepozicion, en la komenco de la kunmetaĵo. Ekzemple la origina “domena” por en la domo kaj “finala“ por al la fino ne facile kompreneblus, do ili fariĝas endoma/e kaj alfina/e.

4). Prepozitivo kun la verba sufikso igi aŭ iĝi, tiel farante novan verbon: surŝipigi, translimigi, endormiĝi, surteriĝi. Kompreneble la –igi verboj estas transitivaj kaj la –iĝi-verboj estas netransitivaj. La samon oni povas fari per la verba pasiva voĉo: La monero jam enskatolatis, netransitiva. Ĉi tiu speco estas variaĵo de la antaŭa.

5). Verbo kun prepozitiva prepozicio. Ekzemple Iri sur (la monton) fariĝas suriri (la monton) kaj Loĝi en (dometo) fariĝas enloĝi (dometon). Ili estas popularaj en Esperanto. En etnaj lingvoj oni uzas aŭ specialan vorton aŭ prepozicion aŭ adverbon aŭ prefikson. En Esperanto tiuj verboj estas transitivaj kaj ĉiam bezonas objekton esprimitan aŭ ne, kvankam kelkaj el ili ricevis netransitivan alternativon kies prepozicio fariĝis adverba prefikso: alveni, eliri.

6). Verbo kun nuda adverbo: plu legi povas fariĝi plulegi kaj ne agi povas fariĝi neagi. Ili estas tre malmultaj, kaj preskaŭ ĉiam nenecesaj. Ili utilas nur, kiam ili estas pli malforta alternativo por mal- aŭ ankoraŭ aŭ aliaj: ankoraŭ dormi kaj pludormi. Ili tiam funkcias kiel prefiksoj.

7). Numeralo malpli granda ol la sekvanta numerala ĉefelemento: kvardek, centmil, en kiuj kvardek estas kvar dekoj kaj centmil estas cent miloj.

8). Substantivo kun sia adjektivo. Ĉi tiuj estas aglutinaj nur, ĉar la specialeco donas al ili alian signifon ol la analizan. Pro ilia ĉeesto en la germana lingvo, kiel esceptoj, Zamenhof kreis plurajn da ĉi tiaj: dikfingro estas tute alia afero ol dika fingro, kaj belknabino tute alia ol bela knabino. Kalocsay kaj Waringhien admonas nin, ne plu krei tiajn, ĉar ili detruus la tutan aglutinan karakteron de Esperanto, ĉar oni ne plu scius la diferencon inter ekzemple granda seĝo kaj grandseĝo kaj inter bona manĝo kaj bonmanĝo. La samo validas por la kunmetoj de verbo kun sia adverbo kaj de verbo kun sia objekto: rapide kuri kaj rapidkuri, kaj ursojn kapti kaj urskapti. Do ni ne kreu pliajn tiajn, por ne riski gramatikan ĥaoson en Esperanto.

9). La pseŭdoprefiksoj (dis, ek, for, mis, re, retro): ekiri, reveni, retroveni. Ili agas kiel adverbaj radikoj: iri eke, veni ree, veni retroe.

10). La pseŭdosufiksoj (eco, aĵo, ino, ilo, igi, iĝi, ema, inda, -ebla, kaj la participaj sufiksoj adjektivaj): fosilo estas ilo por fosi, kaj manĝita estas la karaktero ke ĵus antaŭe io subiris la agon manĝi.

Ĉiuj dek ĉi supraj specoj de vortformado estas aglutinaj, ne ekzistantaj en neaglutinaj lingvoj kiaj la franca. Kompreneble en Esperanto ekzistas ankaŭ kelkaj neaglutinaj vortformadoj. Ili estas unue la veraj prefiksoj (bo, eks, ge, mal, pra, pseŭdo), due la veraj sufiksoj (aĉ, eg, et, um, obl, on, op, po en -poe, ĉj, nj), trie parto de la numeraloj (dek-kvar kaj mil-cent), kaj kvare la aliaj adiciaj kombinaĵoj (angla-franca (vortaro), sekretario-kasisto). Ĉe la du unuaj la ĉefelemento situas antaŭ la flankelemento (kiu krome ne estas la por aglutinoj necesa prepozitivo), kaj la du lastaj eĉ ne povas nomiĝi vortkunmetoj, ĉar interestas streketo; ili simple estas vortkombinaĵoj.

Ni memoru, ke kontraŭe al la kunmetoj sub numero ok, aglutineco teorie malpermesas la kunmetojn de substantivo kun sia adjektivo kaj de verbo kun sia adverbo aŭ kun sia objekto, parte pro la manko de specialeco. Sed tiu malpermeso ne validas tuj kiam oni alikategoriigas aŭ derivas la vorton: ne eblas bonkvalito nek altsalti nek fiŝmanĝi sed tre eblas bonkvalita kaj altsaltigi kaj fiŝmanĝulo.

En etnaj lingvoj oni kelkfoje uzas esceptojn al la regulo ke aglutina kunmeto ne havu infiksojn aŭ finaĵojn interne de unu- aŭ plurradika vorto, ekzemple la germana Blumenladen kaj la nederlanda pereboom. Pro tio, kaj pro manko de scio, multaj Esperantistoj malobeas ĉi tiun regulon kaj uzas la kategoriajn finaĵojn interne de vorto, ekz. multedona kaj blankadoma. Ne ekzistas bezono por tio. Eĉ tre evitinda estas havi la akuzativan -n interne de vorto, kiel sinteno kaj sinmortigi, Ili nepre estu siteno kaj simortigo. same kiel ĉiopova por ĉionpova kaj Diotima por Diontima kaj eĉ postvenulo por posteulo. Zamenhof diris, ke ni uzu, se ni volas, la nenion signifantan literon -o- inter du partoj de kunmetaĵo, do multodona kaj blankodoma, nur pro kosmetikaj tialoj.

La kategoriaj finaĵoj o, i, a, kaj e kaj la verbfinaĵoj kaj la plurala kaj akuzativa finaĵoj nur iomete apartenas al la vortkunmetado, ĉar ili estas nur parte radikoj: ili ja ne povas ricevi sufiksojn nek uzati apartaj nek en alia loko ol je la fino de vorto. Sed ilia loko en la vorto estas aglutina, ĉar la ĉefelemento "o" en "manĝo" estas substantivigita koncepto de la ago "manĝ", la flankelemento.

Marcel Leereveld

★★★

Internacia Tago de Instruistoj 5-a de Oktobro

La celoj de la tago estas altiri ĉies atenton al la stato de la instruistoj en la socio, ilia rolo en edukado kaj evoluigo. La tago estas festata de pli ol 100 ŝtatoj de la mondo.



Jen do la kontribuo de la teamanoj de LBV-retejo por anonci kaj propagandi tiun mondan feston. Unue, aparte ni kore kaj anime aplaŭdas kaj brakumas ĉiujn Instruistojn kaj edukistojn de Esperanto.

Due, ni tre ŝatus kundividi kun la Esperantistaro la **belan, kortuŝan historion** pri unu el la miloj da lernantoj de Legio de Bona Volo (LBV). Tiun artikolon, kies nomo estas


Pedagogio de rezultoj, skribis la verkisto Paiva Netto. Ĝi estas legebla ĉe
https://goo.gl/7AfP7S
Se tiu artikolo plaĉas al Vi, bonvolu sendi al ni vian komenton per la koncerna retpaĝo. Kaj se eblas b.v. plusendi aŭ/kaj aperigi ĝin.
Rilate al edukado, asertas la edukanto Paiva Netto:
"Kiam ĝusta, Edukado liberigas. Kaj kune kun Spiritualeco, ĝi sublimigas".
Nian varman gratulon al ĉiuj Instruistoj kaj Edukistoj en la tuta mondo!
Kaj nian apartan, varman gratulon al ĉiuj Instruistoj kaj Edukistoj de Esperanto!
El la centra sidejo de LBV en urbego San-Paŭlo de Brazilo,
salute, plej amike,
Maria Aparecida da Silva
www.bonavolo.com
www.paivanetto.com/eo
https://www.youtube.com/watch?v=e27VVivBw9I (kun esperanta voĉo)
www.boavontade.com/en
www.paivanetto.com/en

★★

Jen recenzo pri la nova libro de Esther Schor

https://lareviewofbooks.org/article/esperanto-language-of-hope-esther-schors-bridge-of-words/#!





Amike,
Nicole Else

★★★★★

Tre interesa recenzo en la angla lingvo Amike Roger Springer

★★

La Statuto de UEA



Ĉiuj individuaj membroj de UEA ricevis broŝuron kaj voĉdonilon pri ŝanĝoj en la Statuto.
Ŝajnas esti komplika afero ĉar UEA havas dudekojn proponitajn ŝanĝojn.
Bonŝance mi vojaĝas po unu horon tage per buso al kaj el la urbo do mi havas sufiĉan tempon por studi tiun broŝuron detale kaj zorge.
La lasta ŝanĝo okazis en 1979 do valoras pripensadi antaŭ ol fari la decidon jes, ne aŭ sin deteni.
Chris Holliss

★★★





3ZZZ **La elsendo de la 3a de Oktobro certe plaĉos al tiuj, kiuj ŝatas preni parton en konkursoj. Sendu kontribuaĵon kaj ricevu premion, tion ni deziras al vi.**
Mi volas ankaŭ memorigi vin ke Oktobro estas la monato de la radiotono. Donacu malavare tiel ke la Esperanto-grupo en 3zzz povu daŭrigi regule elsendi programon. Henry Broadbent plezure ricevos viajn donacojn . Se ili atingas $20 aŭ pli , via nomo eniros loterion. La premioj estas allogaj.
Eblas kontakti Henry per retmesaĝo je la adreso henryngb@bigpond.com aŭ per telefono (03) 59832731 Franciska Toubale

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Se vi trovis eraron, aŭ mankon, informu min, kaj la eraro, manko ne plu ekzistos rogerspringer@tpg.com.au

.Lernado de fremda lingvo postulas

Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo...
Lernu la gramatikon. Ofte plena da esceptoj de la reguloj.....................
Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo...
Lernu la standardan prononcon Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..
Lernu la lokan parolatan lingvon...
Lernu la ĉiun tagon mallongigitan parolatan lingvon..............................
Lernu la idiomaĵojn de la lingvo ....
Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............

Komparu Esperanton
..Fonetika
..17senesceptaj reguloj
..Kunmetitaj vortoj
..Unu prononco
..Ne ekzistas
..Ne ekzistas
..Ne ekzistas
..Unu monda lingvo

Roger Springer Ĉu vi povus pli bonigi tiun tabelon? rspring@tpg.com.au

★★★

"Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

http://youtu.be/A6Qg88fpDY8____38 minutojn da Bona Esperanto, Bonaj Konsiloj.

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.





http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine_
Vi bezonas nur 5 minutojn ĉiun tagon por tiu programo. ☺
★★★

Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj ĉiutage Klaku, Aŭskultu,Spertiĝu

Por pli longdaŭraj, bonaj aŭskultadoj elektu sube:-

http://esperanto-radio.com/3zzzradio (Radio Melburno)
http://esperanto.cri.cn/radio/info.htm
http://pola-retradio.org
http://muzaiko.info
http://www.radio-vatikana-esperanto.org
http://www.ameriko.org/radiokubo
http://www.budhano.cn/podkasto .
http://www.podkasto.net

http://www.ameriko.org/eo/radioaktiva

Ne eblas lerni naĝadon sen mergiĝi en akvon.

Ne eblas lerni lingvon sen mergiĝi en tiun lingvon.

Aŭskultu Esperantan radion per la reto. aŭ pli?

★★★

La Novaĵletero de Aŭstraliaj Esperantistoj

Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

La ‚Aŭstraliaj Esperantistoj‘ (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.

Skribu al ĉirkaŭ 315 individuaj legantoj, sed en Esperanto, mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne.

La novaĵletero ’Aŭstraliaj Esperantistoj’ subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpaĵojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekteco, oni faras nenion, ĉar la morto atendas nin.

Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

★★★

Interesaj faktoj por Propagando

La mezursistemo havas ekde 1795 logikan facilan metran sistemon.

Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Ĉu lernanto preferus lerni la metran sistemon aŭ la britan sistemon?

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.

Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).

En Hungarujo Esperanto estas elektebla lingvo kiel antaŭfako por universitataj studoj. Miloj da gestudentoj ĉiujare lernas Esperanton.


Eĉ la fuŝa studo de la angla plifaciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj.

★★

Interesaj artikoloj en pasintaj Novaĵleteroj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

ESPERANTO POCKET TEXTBOOK



Poŝa Lernlibro de Esperanto por parolantoj de la angla.

Propagandila kaj Fontindika Libreto.

Havebla en http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo

Elŝutu PDF, 2.4 MB kaj mem kreu kopion de la poŝa ŝlosilo per via komputilo.

La historio de la originala Ŝlosilo ĉe paĝo 7 AE191

"Discover Esperanto".Estas angla traduko de la Esperanto-libreto "Malkovru Esperanton",

Vojaĝu tra Esperantujo!

Kiam, Kie okazas Esperanto-renkontiĝojn

http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm http://www.eventoj.hu/2016.htm

★★

Iloj por Esperantistoj



Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Esperanto-Flago por tabloj ĉe kunvenoj. Bona propagandilo. Vidu AE158.
http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo



Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo.

La scio pri la Esperanto-gramatiko estas unu el la plej gravaj "iloj" por esperantistoj.

(Vidu http://esperantocxemizo.saluton.dk/esperanto-gramatiko .)

Lingvaj Resondoj por ĝuste uzi Esperanton: La plej moderna kaj detala gramatiko klariganta ĉiun aspekton sur la bazo de la gramatiko de la Fundamento de Esperanto. Se vi havas iun ajn problemon (pri gramatikaĵo), Lingvaj Resondoj solvos ĝin ĝuste.
Ĝi haveblas elektronike jene: www.esperanto.com.au , kontraŭ +- $ 20.

★★

Lecionoj, Studoj, Legado, Muziko

Nun vi povas lerni ankaŭ Esperanton per **lingibli.** http://eo.lingibli.com/

Duolingo. Unu el la plej utilaj atingoj por Esperanto estas ke ĝi lerneblos per la ege ŝatata retejo Duolingo.. https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en



lernu! - Learn **Esperanto** online. Live tutors, dictionary, books & music **lernu**.*net/*

Esperanto-kurso "uTalk" La ligo por la elŝuto: http://utalk.com/app. **By EuroTalk**

★★★

Rekomendata Legado, Videoj

"Esperanto sub la Suda Kruco" AEA www.esperanto.org.au info@esperanto.org.au

Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj

EsperantoTV http://www.esperantotv.net/

http://ckuik.com/Esperanto Eniro je Multegaj Esperantaj videoj de Jutubo

Filmetoj de Gian Piero Savio **http://vimeo.com/album/2111699**

http://www.bookbox.com/_La rakontoj estas voĉlegataj de diversaj personoj

The Simpsons https://www.youtube.com/watch?v=M_77-WMZ1nY

LA ESPERO Esperanta himno Bonega por Zamenhofaj Festivalaj kunvenoj

Esperanta kunkanto (Karaoke) kun A-cappella Ĥoruso

Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Unu el la pli facilaj metodoj **http://esperanto.typeit.org/ senpage aŭ**

http://www.typeit.org/app/?lang=esperanto&side **$12.50c**

La specialaj Esperanto literoj estas ĉiuj en la ''Latin 3 Symbols'' supre dekstre sub ''Insert''. Oni alklakas ''Insert'' kaj dekstre aperas ''Symbols''. Oni povas instali la Esperanto-literoj sur la klavaron. **aŭ**

Por vindozaj komputiloj senpagaj Ek! aŭ Tajpi aŭ vidu sube

Angle http://en.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters,

Esperante : http://eo.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters

iPhone Nun estas havebla pli bona Esperanto-klavaro por iPhone/iPad kun iOS8. Oni povas facile ŝanĝi inter la kutima klavaro kaj la Esperanto-klavaro, kaj tajpi rekte en iu ajn programeto: https://itunes.apple.com/au/ap/id951119795

La epoŝta programo "gmail" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone.

Uzu Esperantajn literojn por Mac OS X

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo Vidu AE191



Subtenu Vian



Novaĵleteron



★★

Aŭstraliaj Esperantistoj

La Ricevantoj de la "Aŭstraliaj Esperantistoj"

La nomlisto de "Aŭstraliaj Esperantistoj" enhavas homojn kun konataj nomo kaj retadreso. Individuaj ricevantoj de Esperanto-elsendaĵoj per la reto kaj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo, kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.

Mi ne aldonas iun ajn retadreson se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rogerspringer@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantistoj" estas uzata por sendi aliajn gravajn informojn.

La Klubaj Kontribuantoj al la Novaĵletero

Ĉiuj dekaj eldonoj montras ĉiun tabelon

Aŭstraliaj Esperanto-Kluboj	261	262	263	264	265	266	267	268	269	270	271	272	273	274	275	276	277	278	279	280	281	282	283	284	285	286	287	288	289	290
AEA informas	■									■											■				■				■	
Aliaj Landaj kontribuantoj																				■			■		■		■		■	■
Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo																	■													
Brisbana Esperanto-Societo		■										■					■													
Centra-Marborda Esperanto-Klubo					■																		■			■		■		
Kanbero Esperanto -Kafo-Klubo			■																											
Manlia Esperanto-Klubo	■	■		■	■	■		■	■	■	■	■	■			■	■		■		■	■		■	■	■		■	■	■
Melburna "Meetup" Grupo																														
Melburna Esperanto-Asocio	■																											■		
N.S.K Esperanto-Federacio				■		■	■	■	■			■	■			■	■			■	■		■			■	■			■
Noumea Klubo (NovKaledonio)																														
Novkastela Esperanto-Societo					■																		■					■		
Okcident-Aŭstralio Esperanto-Ligo																											■	■		
Sudaŭstralio			■		■	■				■				■	■			■							■		■	■	■	
Tasmania Esperanta Societo																												■		
Toowoomba Esperanto-Societo		■									■																			
Torkia Esperanto-Kafo-Klubo																														
Viktorio Esperanto-Federacio																														
Whyalla Esperanto-Grupo									■																					
3ZZZ Esperanto-programo					■		■	■	■	■	■	■	■	■	■														■	■
"Informu AE, se estas eraro en la listo" rspring@tpg.com.au																														
	30	29	28	27	26	25	24	23	22	21	20	19	18	17	16	15	14	13	12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1

Eĉ malgranda raporto suficas por reklami vian klubon kaj montru ke ĝi ekzistas. rogerspringer@tpg.com.au

La noma listo por la "Aŭstraliaj Esperantistoj"

	First name	Family Name
1	Abid	Afridi
2	Adam	Hill
3	Adam	Levy
4	Adam	Olechnowic
5	Adrien	FOLLIN
6	Ago (Gus)	Feitosa (Faith)
7	Alan	Turvey
8	Alan	Bishop
9	Alan	Mendelawitz
10	Alan	Collinson
11	Alen	Basic
12	Alex	Huggett
13	Amanda	Markham
14	Amy	Regal
15	Andre	Samosir
16	Andrea	Witt
17	Andreo	Rosenbaum
18	Andrew	Adams
19	Andrew	Lutz
20	Andrew	Maybury
21	Andrew	Spannenberg
22	Andries	Lamers
23	Anna	Clark
24	Anne	Sanders
25	Archana	Joshi
26	Arnie	Schaaij
27	Barbra	Stephen
28	Barbra	Treharne
29	Barrie	Cledsmith
30	Barry	Healy
31	Benjamin	Forster
32	Benjamin	Hook
33	Benno	Lang
34	Bert	Schumann
35	Beth Maree	Shields
36	Betty	Chatterjee
37	Bharat	Ghiomire
38	Bill	Starke
39	Bill k Mabel	Wybenga
40	Birgitta	Carney
41	Blaze	Doric
42	Bob	Mcmaster
43	Bob	Felby
44	Bona Volo	Brazilo
45	Bradley	McDonald
46	Brendan	Linnane
47	Brian	Barker
48	Brian	Dance
49	Brodie	May
50	Bruce	Robertson
51	Bruce	Muhlhan
52	Cal	Milligan
53	Carol	Lutz
54	Caroline	Turner
55	Chan	SY
56	Charles	Stevenson
57	Chris	Jannsen
58	Chris	Krageloh
59	Chris	Morrow
60	Christine	Paul
61	Christine	Holliss
62	Claudia	Layton???
63	Colin	Robinson
64	Craig	Ovenden
65	Crystal	Hill
66	Dale	McManus
67	Damian	Glass
68	Dan	no name
69	Daniel	Kane
70	Daniel	Forrest
71	Danton	Black
72	David	Dalgleish
73	David	Dewar
74	David	Kidd
75	David	Ryan
76	Dee	McCarney
77	Dennis	Murphy
78	Deshan	An
79	Dianne	Lukes
80	Dianne	Mitchell
81	Dmitri	Lushnikov
82	Donald	Rogers
83	Dorothy	Enderby
84	Dorothy	Bysouth
85	Doug	Eising
86	Edith	Mejia
87	Edna	Watson
88	Eko	Nur Hidayat
89	Eleanor	Perno
90	Elijah	McDonald
91	Elizabeth (Libby)	Mortimer
92	Elrae	Adams
93	Emerson	Werneck
94	Erhard	Claus
95	Eric	Hart
96	Erik	Gjessing
97	Erin	McGifford
98	Esperanta	Retradio
99	Esperanto	muzeo
100	Esther	Parris
101	Finnur	Larusson
102	Franciska	Toubale
103	Frits	van Scheepen
104	Fujun	Xiao
105	Gerry	Phelan
106	Giles	Thomson
107	giri	Rao
108	Glyn	Truscott
109	Gordon	Coleman
110	Grace	Alvarez
111	Graf	Gabor
112	Graham	Fennell
113	Halinka	Ejsmont
114	Hannah	Ryan
115	Harald	Schmitz
116	Hazel	Green
117	Heather	Heldzingen
118	Heidi	Goes
119	Helen	Munro
120	Helen	Webb
121	Helen	Palmer
122	Henriette	Vanechop
123	Henry	Broadbent
124	Hermann	Kroppenberg
125	Herve	Diviciacos
126	Hisasi	Kitagawa
127	Howard	Gravatt
128	Hugh	Ramage
129	Huigh	Malcolm
130	Humphrey	Tonkin
131	Ian	McArthur
132	Ian	Green
133	Ian (Jano)	Wylles
134	Ikuko	Kitagawa
135	ilia	Dewi
136	Indrani	Beharry-Lall
137	Indu	Thapalia
138	Ivan	Pivac
139	Jackson	Raeburn
140	Jacob	Sacher
141	Jaga	Oprzedek
142	James	Douglass
143	James	McElvenny
144	Jane	Allen
145	Jared	Martin
146	Jason	Covell
147	Jay	Mooney
148	Jean	Huelsbeck
149	Jeff	Cullinan
150	Jennifer	Birchall
151	Jenny	Bishop
152	Jim	Couch
153	Jim	Radford
154	Jo	Allsop
155	Jo	Turvey
156	Joanne	Johns
157	Joffre	Bell
158	Johano	Massam
159	John	Casey
160	John	Calder
161	John	Forbes
162	John	Adams
163	John	Fleming
164	John	Gallagher
165	John	Lang
166	John	Garvey
167	Jonathan	Cooper
168	Jonathan	Moylan
169	Kam	Lee
170	Katarina	Taggart
171	Katja	Steele
172	Kay	Andersen
173	Kehui	Bao
174	Keith	Bowling
175	Ken	Rolls
176	Kerry	Robson
177	kevin	kenefick
178	Kevin	Warburton
179	Kiah	Morante
180	Kieu Tu	Duong
181	Kirsi	Rossi
182	Lauren	Noble
183	Lauren Victoria	Smith
184	Laurie	Kirwan
185	Lenny	g-----b
186	Leonie	McGlashan
187	Libby	Farris
188	Linda	Danzer
189	Ljiljana	Popovic
190	Louise	Blyton
191	Luke	Marsillo
192	Lumera	Nohill
193	Lyudmila	Kelloway
194	Mana	Brinson
195	Marc	James
196	Marc	Schmidt
197	Marcel	Leereveld
198	Marcus	Dohring
199	Marcus	Gabor
200	Margaret	Chaldecott
201	Margaret	Yue
202	Margarita	Pavlova
203	Maria	Jojkitty
204	Marika	????
205	Marina	Lobanova
206	Marja	Niesen
207	Mark	Smith
208	Mark	Pavic
209	Martin	Gray
210	Maruŝka	Struminskov
211	Mary	Mills
212	Mason	White
213	Mathew	Englezos
214	Matthew	Maguire
215	Max	Wearing
216	Mei	Springer
217	Michael	Waters
218	Michael	Carney
219	Michael	Carney
220	Michael	Zhang
221	Mick	Gallagher
222	Mike	Leon
223	Mike	Taggart
224	Miranda	Lutz
225	Mohammad	Jabbar
226	Morgan	Day
227	Nancy	Roy
228	Nicole	Else
229	Nigel	unknown
230	Nonniefeliz	Nonnita
231	Obed	Niyo
232	Olga	du Temple
233	Owen	Loneragan
234	Pamela	Fenton
235	Patrick (Lize)	Zhang
236	Paul	Burger
237	Paul	Gorny
238	Paul	Desailly
239	Paul	Green
240	Paul	Howlett
241	Paulo	Cesar
242	Pedro	Abreu
243	Penny	Vos
244	Peter	Mitchell
245	Peter	Bird
246	Peter	Cummins
247	Peter	Danzer
248	Peter	Johns
249	Peter	Lim
250	Peter	Weide
251	Peter	Willshire
252	Philip	Nichols
253	Philip	Smart
254	Rae	Watson
255	Rainer	Kurz
256	rani	lyons
257	Rees	Pearse
258	Renato	Corsetti
259	Renjo	Oren
260	Richard	Delamore
261	Richard	Marcus
262	Richard	Penman
263	Rikardo	Newsum
264	Robert	Hoogenboom
265	Robert (Bob)	Bain
266	Roger	Springer
267	Roger	Hill
268	Ronald	Gates
269	Ruth	
270	Sandor	Horvath
271	Sandor	Monostori
272	Sandra	Connors
273	Scott	Brown
274	Shayne	Power
275	Shirley	Gradussov
276	Shresta	Kishor
277	Sibel	Lewis
278	Sidney	Wolifson
279	Siu	Chan
280	Stephen	Landman
281	Stephen	Pitney
282	Steven	Garamy
283	Svetislav	Kanachki
284	Szilvasi	Laszio
285	Teodomiro	Clavis
286	Teofilo Jose	De Jesus
287	Terry	Manley
288	Tiffany	Liu
289	Tim	Stackpool
290	Tim	Warren
291	Todd	Herbert
292	Trevor	Steele
293	Trish	O'Connor
294	Utho	Maier
295	Valencia	Tan
296	valery	matushkov
297	Vera	Payne
298	Vicky	Crickett
299	Volo	Gueltling
300	Wally	du Temple
301	Yvan	Serve
302	Zachary	Grant Fedricksen
303	zc AEA	zx Administrado
304	zc NZEA	zx Administrado
305	zf Fed of NSW	zy